

# Espero

# Katolika

REVUO MONATA EN ESPERANTO

(Honorata per Apostola Beno de Pio X-a, 27-an de Junio 1906)

RELIGIO. — FILOZOFIO. — HISTORIO. — SOCIOLOGIO  
LITERATURO. — ARTO

REVUO DE REVUOJ. — BIBLIOGRAFIO. — 'SAKOJ

« Unum ovile et unus pastor. » (Joh. X, 16.) « Unu ŝafaro kaj unu paŝtanta. »

## ARTIKOLARO

Idea!o Internacia : P-o A. DOMBROVSKI	65
« Volksverein » : P. DESCHAMPS . . .	67
VIVO DE KATOLIKISMO : Faktoj, Ideoj	70
Bela Katolika Ideo : EM. PELTIER . . .	74
Ofero de l' Pupo ( <i>Kristnaska rakonto</i> ) : S-ino VALLIENNE	75
« Pater Noster », el L. RATISBONNE; Esperantigis L. TOUCHEBREUF.	82
La animo de la licenciato Garcias, el LESAGE; trad. VINKO .	82
Katolik-Esperantistaj Societoj	83
Helpo : P-o SCHNEEBERGER	85
Universala Komunikilo	86
Paĝo de l' Direktoro	87
EN LA MONDO ESPERANTISTA. — Noto; Letero al la Redaktoro; Muzika Kroniko; Promenado tra la gazetoj : Prof. E. LIME	87
Ŝakoj. — AL. WAGNER	95

## REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

'Ce la Direktoro : P-o Em. PELTIER

Sainte-Radegonde (Indre-et-Loire) France

*Manuskriptoj neniam estos resendataj.*

Por la FRANCAJ poŝtmandatoj la Poŝtoficejo estas SAINTE-RADEGONDE; por la NEFRANCAJ la poŝtoficejo estas TOURS.

'Ciuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responda nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro. — E. K. estas malfermata por ĉiuj personoj kaj por ĉiuj demandoj (escepte la politikaj).

## KONDIĈOJ DE ABONO

Abono jara : 5 fr. (2 Sm.). — En Franc. 4 fr. (1 Sm. 60).  
Unu numero : 0 fr. 50, a frankite, (20 Sd.)

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj : oktobro, januaro aŭ marto. La Revuo ne aperas en aŭgusto nek en septembro. Poŝtmarkoj estas akceptataj por efektiva valoro.

---



---

**ABONEJOJ DE E. K.**

- FRANCLANDO** 'Ce la Direktoro de E. K. — 'Ce la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, *Paris-V.* — 'Ce librejo Warnier kaj Ko, 15, rue Montmartre, *Paris.*
- ANGLOLANDO** British Esperanto Association, 13, Arundel Street, Strand, *London, W. C.*
- BOHEMUJO-AUSTRIO** : F. Topič, libr. Ferdinandova, 9, *Praha.*
- CILILANDO** ; S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679, *Santiago-Chili.*
- GERMANLANDO** : Moller & Borel, 96, Prinzenstr., *Berlin.*
- HISPANLANDO** : S-o A. Jimenez-Loira, Paterna, *Valencia.*
- HOLANDUJO** : S-o H. B. van ZWET, Heerenweg, 51 bis, *Utrecht.*
- HUNGARLANDO** : S-o Endra Varju IV, Kigyo, U, 62. em. 14, *Budapesto.*
- ITALLANDO** : S-o Jakobo Bianchini, *Fontanafredda de Pordenone (Udine).*
- LITOVUJO** : P-o A. Dombrowski, en *Kovno.*
- NOVA ZELANDO** : S-o A. J. Burges, libr. Devon Street, *New Plymouth (New Zealand).*
- POLUJO** : Arct. libr. Nowy Swiat, 53, *Warszawia.*
- RUSLANDO** : Societo Espero, Bol. Podjaceskaja, 24, log. 19. *S. Peterburgo.*
- SVISLANDO** : Librejo Garin, 20, rue Corrairie, *Genevo.*
- 

*ATĚNTU! Sur la koverto de l' unua numero post la fino de l' abono estos stampata : Via abono finiĝis kun la lasta n-o.*

**ANONCOJ.** — Tuta paĝo kostos 40 frankojn ; — duona paĝo : 25 fr. ; — 4-ona paĝo : 15 fr. , — 8-ona paĝo : 9 fr. ; — 16-ona paĝo : 5 fr. Por anoncoj ripetitaj, rabatoj. — *Por anonci en E. K., sin turni al S-o G. Warnier, 15, rue Montmartre, aŭ al la Direktoro de E. K.*

*Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj nur al la Direktoro.*

---

## **PRESEJO S. MARTINO**

(Presejo de *Espero Katolika*)

Liveras ĉiuspecajn preslaborojn. — 100 vizitkartoj por 1 fr. 50; 200 vizitk. por 2 fr. 50. — Cirkuleroj in-8, presitaj sur unu flanko 200 por 4 fr. 50; 500 por 6 fr.; 1000 por 8 fr.; — duobla folio (sama teksto) 200 por 5 fr. 25; 500 por 7 fr. 50; 1000 por 10 fr.

---

## **MUZIKAJOJ DE S-ino JOSÉE GUIVY**

<b>Ho, Mia Kor'</b> , poezio de D-ro Zamenhof	1 fr.
<b>En Songô</b> , poezio de D-ro Zamenhof.	1 fr. 60
<b>Birdoj, forflugu</b> , poezio el <i>Flandra Literaturo</i>	1 fr. 60
<b>La du Muloj</b> , fablo de La Fontaine	1 fr. 60
<b>Himno</b> , poezio de P-o A. Dombrowski	1 fr. 25

# ESPERO KATOLIKA

HONORATA PER APOSTOLA BENO DE PIO X-a

la 27-an de junio 1907

PRAKTIKA VOJO AL PRECIZA DIFINO

DE IDEALO INTERNACIA

La glora filozofiisto Pola Hoene-Wronski, rigardante *Veron* kaj *Bonon*, kiel du plej altajn celojn de l'homaro, penis difini la manieron, laŭ kiu diversaj civilizitaj popoloj rilatas al tiuj du ĉefaj homaj idealoj. En sia *Métapolitique messianique* (Paris 1840 in-4, pp. 139-140) li donas jenan tre interesan tabelon :

« *Germanoj* Kontinua serĉado de Vero kaj progresiva esploro de Bono.

*Angloj* : Ŝatado de Vero, kaj uzado de Bono.

*Belgoj* : Bezono de Vero, konsidero de Bono.

*Danoj* : Studado de Vero, estimo de Bono.

*Hispanoj* : Enkondukado de Vero, fanatismo de Bono.

*Unuigitaj Statoj de Ameriko* Tendenco al Vero, esploro de Bono.

*Francoj* : Renaskiĝo de Vero, entuziasmo por Bono.

*Grekoj* Reveno al Vero, kontinuado de Bono.

*Holandoj* : Defendo de Vero, subteno de Bono.

*Italoj* : Malfruigado de Vero, konservado de Bono.

*Hebreoj* Espero de Vero, atendado de Bono.

*Poloj* : Atendado de Vero, espero de Bono.

*Portugaloj* Imitado de Vero, reformo de Bono.

*Svedoj* Kulturo de Vero, praktikado de Bono.

*Svisoj* : Subtenado de Vero, defendado de Bono.

*Turkoj* : Malkonfido al Vero, fataleco de Bono. »

Certe, kvankam tiuj ĉi difinoj ŝajnas esti ĝustegaj.

tamen, pro sia troa abstrakteco, ili ne donas sufiĉe klaran ideon pri ĉefa karaktero de ĉiu aparta popolo kaj pri ĝia plej alta *nacia idealo*.

Ke ĉiu civilizita nacio havas pli aŭ malpli konscie sian nacian idealon, pri tio, al mi ŝajnas, ekzistas nenia dubo. Oni povas nur bedaŭri, ke tiuj naciaj idealoj restadas ĝis nun nesufiĉe klarigitaj eĉ al respektivaj popoloj mem.

Kiom mi scias, oni verkis ĝis nun nenan libron, kiu enhavu la objektivan priskribon de naciaj idealoj de diversaj civilizitaj popoloj, eĉ Eŭropaj. Laŭ mia opinio, tia libro estus tre interese kaj instruoplena. Unu homo, eĉ la plej talenta kaj laborema, ĝin verki neniel povus pro manko da necesa materialo. *Unu verkisto povus priskribi nur la idealon nacian de sia propra popolo, ekzemple: Ruso — nacian rusan idealon, Polo polon, Franco francan ktp.* Kompreneble tiuj verkoj havos plenan sian valoron nur eĉ unu kondiĉo — absoluta sincereco.

Konsiderante, ke nune ĉiu nacio civilizita havas jam ne unu talentplenan esperantiston, mi kuraĝas proponi al komuna atento la sekvantan projekton: naciaj esperantistoj *anoncu konkurson* por verketo pri naciaj idealoj de siaj respektivaj popoloj. Tiuj konkursoj sendube havos sukceson kaj tiamaniere en mallonga tempo aperos serio de interesej verkoj pri naciaj idealoj de diversaj civilizitaj nuntempaj popoloj. El tiuj verketoj oni povos poste ekfari la sufiĉe vastan *verkon pri naciaj idealoj*, el kiu ĉiu klera leganto facile povos ekvidi, *kion la nuntempaj popoloj plej multe ŝatas, kion ili plej varme deziras, al kio ili senlace celas, kien ili sin turnas, kion ili volas kredi, scii, fari, ktp.*

La komparo de diversaj naciaj idealoj, mi esperas, donus tute neantaŭviditajn, tre gravajn rezultatojn. Ĝi eble elmontrus, ke ne ĉiuj idealoj naciaj estas veraj kaj ŝatindaj, ke eble sin trovas idealoj tute kontraŭaj, reciproke sin eskludantaj, neigantaj kaj per tio meritantaj pli nomon de *idoloj* ol de *idealaj*...

Unuvorte el tiu libro pri naciaj idealoj, eltirante ĝian

kvintesencon, oni povus alveni al *unu vere internacia idealo* en ĝia trispeca formo : *sociale, politika kaj religia*.

Prezertante tiun ĉi projekton al instruita legantaro de *Espero Katolika*, mi havas nenion alian celon, ol plenumi mian devon. *Dixi et animam meam levavi*. Mi faris, kion mi povis. *Faciant meliora potentes*.

P-o. A. DOMBROVSKI.

---

« VOLKSVEREIN »

*Aŭ Katolika Organizado en Germanujo.*

‘Hodiaŭ, kiel ĉiam de la alveno de Jesu-Kristo sur tero, la sola forto morala, sociala, religia troviĝas en la Sankta Katolika Eklezio.

Kie la fideluloj sciis kuniĝi per organizado, tie ili kontraŭbatalas sukcese ĉiujn potencojn de l' malbono.

Pri tio, nuntempe, la Germana Katolika Centro estas la plej evidenta elmontro.

Windhorst, ĝia glora fondinto, skribis en 1890 : « La politika kaj sociala ordo ŝanceliĝas sur siaj fundamentoj. Al la kolektivista anarkio, oni devas kontraŭmeti remparon de forta organizado... Ni unuigu niajn klopodojn kaj ni marŝu kontraŭ ĝin per densaj vicoj.. Ni fondu grandan ligan, kunigantan ĉiujn regionojn de nia patrujo. La rezultato de tia interligo estos organizi niajn fortajn, multobligi niajn agilojn, direkti kaj plifortigi metode nian aktivecon pri la gazetaro, la broŝuroj kaj kunvenoj; tiamaniere la socialistoj trovos nin armitaj eĉ en la plej malgrandaj vilaĝoj, kaj ĉie ni forpelos venke la eraron, lumigante la veron antaŭ la popolo. »

— Funkciado. — La Komitato, kunmetita el industriistoj, bienuloj, ĵurnalistoj, scienculoj, profesoroj, financistoj, advokatoj, ekonomiistoj, ke, kunigas la eminentularon de la Germanaj Katolikoj. Ĉiuj imperiaj regionoj havas tie reprezentantojn kaj, ĉar nenio fariĝas en Ger-

manujo sen la pastraro. la direktanta Komitato enhavas ankaŭ pastrojn, kaj tiuj ĉi ne estas la malplej gravaj.

La radaroj de la grandega maŝino estas rimarkinde simplaj kaj efikaj.

Jen kiel funkciadas la Societo

La Komitato elektas en ĉiu distrikto agenton, konfidaton, kun kiu ĝi rilatas senpere kaj konstante. Al tiu estas komunikataj ĉiuj disdonataj dokumentoj. libroj kaj broŝuroj. Por trafi la popolon, la konfidato siaflanke sin turnas al kelkaj sindonaj homoj, elektitaj en ĉiu paroko; poste li sendas al siaj parokaj agentoj cirkuleron montrantan la esencajn devojn de ilia ofico.

Jen unu el tiuj cirkuleroj

1) Vi rondirigos de domo en domon la nomaron de la anoj, vi penados varbi kiel eble plej multe da aliĝantoj;

2) Vi kolektos la jarajn kotizaĵojn, kiujn vi sendos al la Konfidato;

3) Vi donos al la aliĝintoj la societistan karton, kiu estos samtempe ilia jara kotizaĵa kvitanco;

4) Vi disdonos al la aliĝintoj la broŝurojn kaj aliajn presaĵojn, kiujn al vi liveros la distrikta agento;

5) Vi informos tiun ĉi pri ĉio grava okazanta ĉirkaŭ vi, rilatanta la societon.

Tiu-rimede, oni povos komenci en ĉiu vilaĝo per tre modesta personareto. Sufiĉas en ĉiu loko unu aŭ du sindonaj homoj, por ke la Societo povu tuj enradikiĝi ĉie en la lando. Nu, ĉie troviĝas tiuj homoj; estos almenaŭ tie la paroka pastraro la parokestro kaj vikarioj estas la naturaj helpantoj de la Societo; simplaj fideluloj helpas ilin iom post iom, kaj tiel la direktanta Komitato povas agi efike pri ĉiuj Katolikoj de ia regiono.

La Societo varbas nur virojn; laŭ la dua artikolo de ĝiaj reguloj, oni devas esti plenaĝa por partopreni en ĝi. Oni precipe celas varbi la elektantojn, tio estas, la partoprenantojn en la publikaj aferoj; ili estas la veraj soldatoj de la granda katolika armeo. Ĉiu homo varbita en la Societo estas rekruto forprenita de la socialismo, decida

kontraŭulo de l' anarkio; de tio devenas la graveco de tiuj aliĝoj, la nepra neceseco trafi kiel eble plej rapide kaj plej multe da homoj.

La jara kotizaĵo de la Societanoj estas 1 fr. 25 (50 Sd.) n algranda sumo, sed kies graveco ne estas diskutibla. Kiu promesas pagi tiun kotizaĵon interesigas vere je la partio alprenita; li pripensas antaŭ ol subskribi. Li ne intencas moki aferon, pro kiu li elspezas ĉiujare parton de sia ŝparo.

Per tiuj rimedoj la Komitato faras sian propagandon.

'Gi penadas antaŭ ĉio konigi la kontraŭbatalotan malamikon. Socialismo estas ateismo, neado de Dio. 'Gi estas forigo de l' individua propraĵo, ĝi estas libera amo, ĝi estas absoluta neado de la libereco, ĝi estas la venkego de malmodera tiraneco.

'Ciujare oni havas popolan kunvenon almenaŭ en ĉiu distrikto. Se sur ia difinita punkto perfortas agitado revolucia, tie la *Volksverein* eksterordinare kunvenas.

Plie, la Komitato volas periode kontroli la progresojn atingitajn, kaj por tio ĉiuj anoj estas kunvokataj ĉiujare por plena kunveno.

La kongreso sidas laŭvice en la precipaj Germanaj centroj. Oni raportas pri la plej interesaj detaloj de tiuj plenaj kunvenoj, kaj tiu dokumentaro estas enpresata en *revueto* sendata al ĉiuj Konfidatoj. Tiamaniere ĉiuj societanoj estas informataj pri la vivado kaj progresoj de l' afero. Ili estas fieraj aparteni al tiel pova Societo, kaj la konscia sento pri sia forto igas ilin propagandistoj kaj socialaj apostoloj.

Tiu organizado estas mirinda. Tiu elpenaĵo de l' *Volksverein* (1), tiu katolika Societo, kiun oni povus nomi la lastan penson de Windhorst, estas la ĉefverko de lia mirinda politiko.

---

(1) Vidu la verkojn (en Franca lingvo) de Lia Prelata Moŝto Kannengieser: *Ketteler kaj la sociala organizado en Germanujo*; — *De etapo al etapo*. — 10, strato Casette, Paris; Lethielleux.

Jen skizo de tiu organizado katolika, kiu mirigas aliajn naciojn per siaj rezultatoj. Ni pensas, ke la konigo de l' *Volksverein* utilos al niaj alilandaj samreligianoj, kaj instigos ilin al la kreado de simila organizado.

Esperantigis P. DESCHAMPS.

---

## LA VIVO DE L' KATOLIKISMO

---

### FAKTOJ

**ROMO.** — Kardinaloj Rampolla, Mercier kaj Maffi longe studadis la rimedon por faciligi la laboron al multaj katolikaj sciencistoj, kiuj deziras esti utilaj al la Religio, sed ne havas la monajn rimedojn por tio.

La eminentaj Kardinaloj havis la ideon krei vastan societon internacian, kiu ne nur liverus monon por la sciencaj laboroj, sed estus mem vivanta apologio de l' Katolikismo. Romo, urbo de l' Papoj, kaj tute internacia, estis plej taŭga kiel sidejo de tiu grandioza entrepreno.

Oni informas nin, ke Provizora Komitato estas fondata, en kiu eminentaj sciencistoj troviĝas, nome P. Hagen, Direktoro de l' Vatikana Observatorio, kaj S-o Toniolo la tre konata sociologo Itala. Oni jam publikigis la regularon de la Societo.

Kiun lingvon uzos tiu *internacia* societo? Estas dezirinde, ke oni provu detale konigi al la Komitato la lingvon Esperanto.

**RUSUJO.** — Novaĵoj preskaŭ nekredeblaj alvenas de Vilna (Rusl.). Monsinjoro Ropp, episkopo de Vilna, estas forpelita el sia diocezo. La Rusa registaro malpermesas al li la vivadon en S. Peterburgo, en Polujo kaj Litovujo. La sola motivo de tiu nekredbla fakto estas, ke Monsinjoro Ropp tre serioze uzas la konstituciajn liberecojn. La partio, kiun li kondukas kaj al kiu li liveris socialan



programon. prosperis forpeli el sia diocezo la socialismon.

Ni esperas, por la honoro de l' Rusa registaro, ke tiu persekuto estas farita nur de la « rutinula » oficistaro, kaj ke la supera aŭtoritato justece agos pri M-o Ropp por montri, ke la konstitucia libereco ne estas nur ridinda trompilo en Rusujo.

*BRAZIL- kaj PERULANDO.* — La ŝtata sekretario de l' Vatikano konigas, ke la respublikoj Brezil kaj Peru ĵus decidis konfidi al arbitracia tribunalo la solvon de la malfacilaĵoj ekzistantaj inter la du nacioj. Oni elektis kiel prezidanton de tiu tribunalo la Papan Noncon ĉe *Rio-de-Janeiro*.

— Depost kiam ni skribis pri la *Internacia Scienca Societo Katolika*, Pio X-a elektis S-on Pastor, kiel ĝian Sekretarion. La klera historiisto Germana ĝuas grandan famon en la mondo. S-o Pastor, post interparolado kun Leo XIII-a, ricevis la plenan permeson por ĉiuj sciencistoj serĉadi laŭvole en la arkivoj de l' Vatikano kaj uzi ĉiujn dokumentoj, kiuj troviĝas en tiu riĉega mino. Leo XIII-a afable diris al S-o Pastor « Dio ne bezonas mensogojn ».

— *Pri la « Variantoj » en la « Vulgata » eldono de Biblio.* La R. P. Gasquet Prezidanto de l' Kongregacio Benedikta Angla, ricevis de Pio X-a la taskon daŭrigi la verkon de scienca « Barnabito », P. Vercellone, kiu eldonis en 1860-1864 tri aŭ kvar « in-folio » : *Variae lectiones Vulgatae latinae*. Lia laboro iras ĝis la Paralipomen'. La morto haltigis lian verkadon en 1869.

Tiel granda verko postulis la kunlaboron de scienca asocio, ĉar ĝi superas la fortojn de unu homo; ĝi postulas serĉadojn en diversaj landoj kaj bibliotekoj, kie ekzistas manuskriptoj de l' *Vulgato*. La Benediktaj Monakoj estis tre taŭgaj por tio, ĉar tiaj laboroj tute konvenas al ilia celo. En la lasta ĝenerala kunveno (nomata Ĉapitro), en Romo, P-o Gasquet estas elektita por direkti la tutan laboron. Li estas tre konita per siaj libroj pri la religia historio de Anglujo *Henry VIII and the monasteries*

(6-a eldono); *Edward VI and the Liturgy; The old English Bible; The Ere of the Reformation*, kc.

Dom Gasquet jam grupigis kunlaborantojn, kiujn li elektis en sia Kongregacio. Oni citas jenajn nomojn : Dom Laurent Jansenn, rektoro de monakejo S. Anselmo, sekretario de la Biblia Komisio; Dom Amelli, estro de l' monakejo de l' Mont-Cassin'.

Pio X-a tre interesigas pri tiu scienca laborado. Ricevinte Dom Gasquet, li esprimis sian deziron, ke oni tre aktive faru la laboron.

#### IDEOJ

La *Unuiĝo de l' Kristanaro* estas unu el la plej nuntempaj kaj interesplenaj demandoj. Oni legas en *Revue du Clergé Français* (1) longan kaj atentindan artikolon pri tiu temo sub la titolo : *Où en est la question de l' Union des Églises* (Kiu estas la stato de l' demando pri l' Unuiĝo de l' Eklezioj). Pastro J. Clavet, la tre klera aŭtoro, estas plej kompetenta pri tia temo, ĉar li dediĉas sian vivon al la *Unuiĝo*, kaj kunlaboras al la bonega gazeto *Revue Catholique des Églises*. Ni petis permeson por plene traduki tiun artikolon. Hodiaŭ ni liveras la sekvantan ekstrakton, kies graveco estos komprenata de ĉiuj

« Kia estas tiu unuiĝo, pri kiu ni parolas kiel pri baldaŭ efektivebla afero? Tre grava estas, ke ni diru ĝin precize, por antaŭe respondi la kontraŭdirojn, kiuj nature prezentas sin al la inteligenteco.

La reunuiĝo, kiun ni deziras, ne estas konfuza sinkretismo doktrina, al kiu la religioj kaj eklezioj alvenus konservante nur minimumon de sia kredo, tiamaniere, ke ili tenus nur la ideojn komunajn al ĉiuj homoj, kiuj havas religian senton : oni tial ricevus abstraktan restaĵon, kiu ne havus religian eksteriĝon, oni venus simple al la

dissolvo de l' Eklezioj por unuigi ilin. Nu, ni pretendas, ke l' *Eklezio* ekzistados kun sia tuta organismo, kaj ke la fido estos integre konservata.

La unuigo, pri kiu ni parolas, ne estas konvertigo de l' disigitaj Eklezioj, kiuj forlasus siajn « erarojn » kaj ekzistadon por esti ensorbataj en la latina Eklezio (1).

La unuigo ne estas federo de aŭtonomaj Eklezioj, kiuj, konservantaj sian plenan sendependecon, interkonsentus por meti sub miksa tribunalo la konfliktojn, kiuj naskiĝus inter ili kaj, praktike, unuigus siajn penadojn por batali kontraŭ la komunaj malamikoj, kontraŭ ateismo, alkoholismo, trolibereco de l' stratoj, ke. Tiu interkonsento por agado morala kaj religia estas tre dezirinda, — mi parolos pri ĝi poste, — sed oni ne devas kredi, ke ĝi egalvaloras, en ia grado ajn, la unuigon de l' Eklezioj. Ĝi povos prepari la unuigon; ĝi ne estos la unuigo.

La unuigo, kiun ni deziras, ne estos konsekvenco de traktaĵo aŭ interkonsento politika. Ĝi estos fakto. La Eklezioj unuigos, ian tagon, ĉar ili sentos sin « identikaj » en siaj esencaj kredoj; ili unuigos, ĉar ili sentos sin jam unuigataj. Se ĉiu el ili laborados por pliproksimiĝi al la idealo, kiun Jesu-Kristo montris al ni, se ĉiu el ili penados por pligrandigi en siaj membroj la kariton, venos tago, kiam ĉiuj disciploj de Jesu-Kristo sentos, ke la skismo ne havas plu motivojn, ke ĝi estas la granda peko kontraŭ Jesu-Kristo, kaj pro Kristana spirito ili ĉesigos ĝin. La Eklezioj tiam unuigos en la sama Kredo, en la obeo al sama ĉefo, konservante en la unuigo la neesencajn diversajojn pri disciplino kaj liturgio, kiu dependas de historio aŭ de l' moroj de la nacio, en kiu ili vivadas. Estos « pluraj » Eklezioj *Kristanaj* kaj unu Eklezio *Katolika* (2).

---

1. Pastro Tondini de Quarenghi (*La Russie et l'Union des Eglises*, Rusujo kaj Unuigo de l' Eklezioj; Paris. Letheilleux, eldonisto) konstatis la influon de tiu ideo en la Rusa Eklezio. Paĝ. 61 k. sekv.

2. Tia estas la doktrino de Leo XIII-a en Encikliko *Præclara gratulationis* (20-an de jun. 1891).

## BELA KATOLIKA IDEO



La dankeco estas io tre malofta sur tero, eĉ dankeco al Dio. Ŝi konigis al ni Asocion, kies nomo estas *Unuiĝo por ĉiama dankeco al Mario senmakula*. Jen ĉi estas legata en la Regularo

« Nia Sinjoro montris en diversaj cirkonstancoj la gradon laŭ kiu li estimas la dankecon.

« Ĉiu-jare, la 13-an dimanĉon post Pentekosto, la sankta Eklezio legigas la rakonton pri la saniĝo de l'dek lepruloj, kaj rememorigas nin pri la dolora riproĉo, kiun la Bona majstro faris al la naŭ maldankeculoj, kiuj ne revenis por dankodoni...

« Dum liaj aparicioj al la Beata Margarito-Mario, la Dia Savinto montris al ŝi kiom la sendankeco de homoj ĉagrenis lin.

« La koro senmakula de Mario sentas ĉiujn impresojn sentatajn de l'Koro de ŝia Filo.

« Ĉu la Koro de Nia Sinjoro ne estas ĉiam la fonto de ĉiuj gracoj; ĉu la Koro senmakula de Mario ne disĵetas ankoraŭ sennombrajn bonaĵojn sur siaj infanoj? Ŝi ilin donacegas precipe al tiuj, kiuj portas sur si la Miraklan Medalon, sur tiuj, kiuj pilgrimas al Lourdes kaj al « Notre-Dame-des-Victoires » (N.-S-ino de Venkoj).

« Ho ve! kiel granda estas la nombro de tiuj, kiuj forgesas danki! kaj kiom tiuj maldankeculoj ĉagrenas la amemajn korojn de Jesuo kaj Mario!

« Tamen la dankeco estas devo kaj samtempe ĝi altiras novajn favorojn...

« Tiaj estas la pensoj, kiuj naskis la *Unuiĝo por ĉiama dankeco al Mario senmakula*.

— Plezure ni kolektos la nomojn de tiuj, kiuj deziras fariĝi membroj de la *Unuiĝo*, kaj ni sendos ilin al la Direktoro, kiu estas samtempe direktoro de l'Ĉefkunfrateco de *N.-D. des Victoires*.

EM. PELTIER.

## OFERO DE L' PUPO

(*Kristnaska rakonto*)



Neĝas, neĝas, seninterrompe neĝas.

Horizonto mallume griza ŝajnas enhavi neĝujojn plenajn je dikaj minacantaj neĝeroj. Oni sin demandas, ĉu blua povos refariĝi la ĉielo, verdaj la arboj; ĉu iam oni denove aŭdos la kantadon de birdoj.

Jen estas la gravaj demandoj, kiujn al si faras Nelly; sed ŝi ne povas ilin respondi. Estas vere, ke ŝia nur kvin-jara sperteco lasas al ŝi la kampon libera por multaj aliaj temoj de observado.

'Cio estas funebra en la kamparo kaj malgajiga en la kastelo, ĉar ŝia avino malsanegiĝis. Nelly estas tute certa pri tio. Vane oni parolas mallaŭte kaj per malprecizaj vortoj, la infanino ĉion homprenis, kaj pro tio ŝi sentas grandegan ĉagrenon.

Subite ŝi aŭdas, ke pordoj malfermiĝas, kaj rimarkas nekutiman el- kaj aliradon en la domo, silenta de multaj tagoj.

Ho jes, ŝi memoras nun: tio estas la konsiliĝo okazonta inter la du famaj sciencistoj venigitaj el Parizo. Sed vane ili estas du; ĉu ili povos savi ŝian avinon? Ne; ĉar tio ne apartenas al homaj fortoj. Kvankam estante nur infanino, ŝi tamen divenis tion; kaj ŝi sentas, ke ŝi ne eraras.

Ne ŝajnante atenti, jam ruzema, jam virino, la infanino alpaŝas kun indiferenta mieno; kaj tiamaniere, kruciĝinte kun la du doktoroj, ŝi ekkaptas pasante kelkajn vortojn, kiujn preterlasis tiuj du sinjoroj

« Ŝi estas pereonta, ili diris nur miraklo povos ŝin savi. »

Bona Dio!" Ĉu vere tio estas ebla? Ĉu ŝia bona avino povas foriri subite al Paradizo, lasinte sur tero siajn genepojn kaj precipe Nelly'on, la plej malgrandan, la plej beletan el la geneparo, kaj precipe la plej amegitan.

La infanino ne ploras. Ĉu ploroj povas utili? Ili kon-

dukas al nenio, kiel al ŝi rimarkigis Petro, ŝia plej altkreska frato. Anstataŭ sin malstreĉi, anstataŭ sin fluidigi en larmoj (cetere tio malbeligas), estas prefere, kiam oni havas ĉagrenon, elpensi ion, kio nin eltiras el embaraso.

« Ŝi estas pereonta; nur miraklo povos ŝin savi. »

La infanino sensfine rediras al si tiun saman frazon, kiu sonoras en ŝia kapo, kiel funebra tombsonorilado.

Subite ŝi ekkrias :

« Unu miraklo? Se l tio jam estis vidita : kial tio ne denove vidiĝus? Ofte sufiĉas preĝadi por ĝin ricevi : tia estas la opinio de sinjoro abato. »

Ho ! rimarkin la efiko de sinsekvado de ideoj ! Neĝas ; ni estas en decembro, la monato de malgranda Jesuo. Li loĝas ĉi tie, kuŝanta en la Dinaskejo, funde de l'kapelo. Nun Nelly al si memoras sian longan diskutadon kun siaj gefratoj ; ĉar ŝi ne akceptis, ke la dia infano estu metita sur simplan pajlon, sur kiu li certe suferos malvarmecon, dum ŝi havas beletan liteton envolvitan de rozkoloraj littekstaĵoj. Si estus volinta lin forporti for de la kapelo, por lin meti en la ĉambron de infaninoj, ĉar ŝia malgranda koro estas amema kaj kompatema.

Nu, ŝi iros al li, al bona Jesuo. Infanoj sin tuj komprenas reciproke. Kaj ŝia peto estas tiel justa, ke ŝi ne dubas : ŝi estas certa, ke la favoro de ŝi petita estos donita sen ia prokrasto.

Tamen ŝi aŭdis, (ĉar ŝi havas tre aŭdemajn orelojn, la kara infanino) ke, por ricevi ĉielan favoron, oni bezonas kelkafoje fari oferojn. Certe por savi sian avinon, ŝi estas preta fari ĉiujn imageblajn oferojn : Sed tamen ŝi devas elekti. Si jam silabis en la Sankta Historio kelkajn paĝojn, en kiuj oni parolis pri oferoj de ŝafidoj, de ŝafinoj, eĉ de bovoj. Sed ĉiuj homoj, kaj precipe knabineto kiel ŝi, ne havas ĉiam en sia dispono tiaspecajn bestojn. Do ŝi serĉas alian aferon. Se ŝi oferus kolombojn ? Tiuj birdoj flugadas are super la tegmento de la kastelo. Sed kiamaniere ilin ekkapti ? Ne, decide, prefere estas forlasi tiujn naŭzigajn buĉadojn.

Denove Nelly pripensas, profunde kaj tre serioze proponas al si tiun demaŭdon :

« Kio estas ofero ? »

Ha ! nun ŝi trovis. Oferi estas forlasi sen espero de reakiro ion, kion oni ŝatas treege.

Nun, ekster la anoj de sia familio, kion ŝi plej ŝatas ? Kia estas la afero, kies perdo ŝin pli grave ĉagrenus ?

Ĉu tio estas ŝia angla ĉareto ? Ne vere.

Ĉu ŝia hundeto Fox, kiu similas frizitan bulon ? Ne ankoraŭ.

Ĉu prefe e Nanette, ŝia plej granda, plej luksevestita pupo ? Jes, jes, jes — pri tio, dubo ne estas ebla.

Post tia respondo tiel klara, tiel preciza, ne ŝajnas plu ebla ia ŝanceligo. Estas Nanette, kiun ŝi oferos ; al kiu ? al malgranda Jesuo, por ricevi de li la tiel deziritan miraklon.

Do jen estas Nelly, kiu grandpaŝe aliras al la ĉambro de infaninoj. Si malfermas la tirkeston, en kiu Nanette estas kuŝanta, meze de ĉarmoplennaj kaj senutilaj aferoj, kiuj faras ĝian beletan vestaron. Rapide, rapide, kvazaŭ ŝi ne volus doni al si tempon por bedaŭri, ŝi vestas la pupon per ĝia plej bela kostumo, el silkaĵo tute ornamita de punktoj, ĝin rigardadas unufojon ankoraŭ en ĝia tuta beleco, ĝin kisas sur ĝiaj ambaŭ vangoj, dirante al ĝi adiaŭ, kaj tre singarde, timante, ke ŝin surprizos ia plenaĝulo. Ŝi sin direktas al la kapelo.

« Mi esperas, ke ĝi estos senhoma, ŝi pensas, por ke mi povu plenumi mian oferon sen ia prokrasto. »

Puŝinte malforte la enirejan pordon, la knabineto ne forgesas fari signon de kruco, kvankam ŝi portas Nanette, kiu tamen estas tre peza. Ŝi rigardas dekstren, maldekstren : neniu homo troviĝas en ĝi. Tio estas vere providenca.

Tiam kun malpetola mieno, ŝi iras rekten al la Dinastejo de malgranda Jesuo, en ĝin metas la pupon, kaj ĝin sidigas belmove inter Melchior kaj Balthazar, murmurante tiun preĝeton



« Mia bona malgranda Jesuo, por savi mian avinon mi donas al vi mian pupon. Mi tre bone scias, ke vi ne estas tute sola en la kapelo; ĉar la anĝeloj societiĝas kun vi. Pro tio konservu mian pupon por doni al viaj malriĉuloj. mia malgranda Jesuo. Ĉu vi min komprenis? Jes. Ĉu vi bonvolas savi mian avinon? Jes. jes. »

Malgraŭ sia kuraĝo, Nelly sentas, ke granda emocio ŝin ekokupas. Pro tio, farinte al la dia infano belan reverencon, ŝi rapidas realiri al siaj gefratoj, penante preni kiel eble plej naturan ŝajnon.

Estas la tria, horo en kiu meditadas sinjoro abato Vignet, gubernisto de Petro kaj de Johano. Li estas klera scienculo, en kiu miksiĝas revemulo. Pro tio li pasas tra la vivo kun okuloj altiĝantaj al ĉielo kaj tio fariĝas kauzo de malatentaĵoj, pri kiuj li unua ridetas.

Enprofundiĝante en siajn pensojn kiel ĉiam, la ekleziulo eniras en la kapelon, rimarkinte nenion nenormalan, kaj sin liveras al siaj piecaj ekzercadoj. Sed subite, meze de litanioj al Sankta Virgulino, lia rigardo ekfalas sur la Dinaskejon. Ekkrio de miro eliras el lipoj de la sankta homo, kiam li vidas, ke pupo elmetas sian luksaĵon kaj sian vaksan vizaĝon piede de altaro. La abato Vignet frostas siajn okulojn: sed tuj li konstatas, ke li ne estas ludilo de sent-eraro.

Kiu povis kuraĝi tian malkonvenaĵon? La infanoj de la kastelo estas tro bone edukitaj por moki tiel malrespekte la religiajn aferojn pri kamparaj geknaboj, ili ne havas tiel multekostajn ludilojn.

Post multaj demandoj faritaj al si mem, kaj ne responditaj, la abato decidas, ke li faros tiun simplan aferon: li formetos la pupon.

Feliĉe troviĝas neniu ĉecstanto en la sankta loko: ĉar estas komike vidi tiun ekleziulon, kiu portas pupon. Se ĝi pezus cent kilogramojn, estas certe, ke la abato ne uzus pli da forto por ĝin sublevi. Por aliri al la kapeloficejo kun sia malpeza ŝarĝo, li malordigas benkon, renversas katedron kaj faligas preĝoseĝon. Fine li estas alveninta,



rapide metas Nanette'on sur apogseĝon, kaj tuj sonorigas por venigi la serviston difinitan al la servado de la kapelo.

Post kelkaj minutoj, ĉi tiu aliras tute sufokiĝante

« Kio okazas? sinjoro abato, li diras. Mi estas preta por vin servi. Nu, pupo! li ekkrias skandalita, pupo en kapeloficejo!

— Sed, amiko mia, ne estas mirinda afero, pupo en kapeloficejo. Kion vi estus dirinta antaŭ momento? Ĝi troviĝis en la kapelo mem.

— En la kapelo mem?

— Kaj plie sidanta en la Dinaskejo. Eĉ nur pro tio mi sonorigis, por ke vi donu al mi klarigojn.

— Sed vere, sinjoro abato, estas mi, kiu petus de vi klarigojn, prefere ol mi ilin donus al vi. Nur unu aferon mi kredas povi certigi: ĝi estas la pupo de fraŭlino Nelly.

Subite la servisto frapas sian kapon kaj komencas turmenti la butonojn de sia vesto kun embarasita mieno.

« Nu, diras la ekleziulo, parolu, amiko mia. Vi deziregas tion fari, sed vi ne kuraĝas.

— Mi timas vin kolerigi, sinjoro abato.

— Ne timu, kaj konigu vian suspekton. Sen tio vi baldaŭ havos plu neniun butonon sur via vesto.

— Nu, sinjoro abato, vi estas tiel malatentema, pro ĉiuj belaj aferoj, kiujn vi havas en via hapo, ke mi demandas min, ĉu ne estus vi mem, kiu estus metinta tiun pupon, kiam vi preparis la aliajn objektojn de la Dinaskejo. »

La abato levetis la ŝultrojn, kaj aldonis ridante:

« Vere tiu parizanino tre malperfekte reprezentas maĝian reĝon. Mi dankas vin pro viaj klarigoj, amiko mia; sed mi faros mem mian enketon. »

La abato lasas sian meditadon kaj la pupon por aliri al infanoj. Ĉiuj ĉeestas ĉe la lernoĉambro, sin klinante al siaj lecionoj. Tuj kiam li aperas, lin akceptas afabla rideto de liaj junaj lernantoj, kies li partoprenas laborojn kaj

ludojn. Sed li ilin admonas, ke ili daŭrigu sian taskon; kaj sin turnante al Nelly

« Oni trovis vian pupon en la kapelo, infanino mia, li diris.

— Tio ne min mirigas, sinjoro abato.

— Kaj kiu ĝin metis tien, mi petas.

— Estas mi.

— Tio estas tre malkonvena kapelo ne taŭgas por pupo.

— Vi estas prava sed tiu pupo taŭgas por tiu kapelo. Ne min riproĉu, sinjoro abato. Konservu mian Nanette-on; neniam redonu ĝin al mi. Cetere tio estas sekreto inter malgranda Jesuo kaj mi. Vi scios ĉion, kiam mia avino estos resaniĝinta; ĉar ŝi baldaŭ resaniĝos: mi tion anoncas al vi, same kiel al ĉiuj aliaj personoj. »

La abato ne insistas, ĉar la farto de la bona avino montriĝas tiel malesperiga, ke estas pli bone gliti sur tia temo. Cetere li konas la firman kaj decidan karakteron de la knabineto, al kiu li ĵus parolis. En tiu momento, la sola afero farebla estas do aliri al la kapeloficejo, kaj en ĝin enfermi Nanette-on.

Jes, ĝin enfermi tio estas facila parole; sed troviĝas en tiu ĉambreto nur du ŝrankoj. Li ne povas meti tiun pupon en la ŝrankon por ekleziaj ornamaĵoj, tio estus preskaŭ malrespekto, nek en la ŝrankon por balailoj, ĉar en ĝi Nanette riskus havi sian kapon rompita. Kion fari? La abato Vignet ne povas do sin liberigi el tiu pupo.

La ĉambristinon kaj la tolaĝistinon tro okupas la malsano de la bona avino, por ke li kuraĝu peti ilian helpadon pri la bela ludilo. Pro tio la ekleziulo brave prenas malesperan decidon. Li trovas ĵurnalon, *la Pilgrimo*, kaj penas involvi en ĝi la pupon, por ĝin porti en sian propran ĉambron. Sed la paperfolio estas tro malgranda la piedoj de Nanette preteriras. La abato tiras al si la ĵurnalon; jen estas la kapo, kiu aperas. Ĝi ŝajnas ridi kaj diri « Ku-ku! » Vere la momento ne estas bone elektita por moketi. Ekmovon de malpacienco preterlasas la abato.

Li ŝiras sian unikan *Pilgrimon*, kiu baldaŭ estas aliformigita en mizeran ĉifonaĵon.

Tio fariĝas neripareblaĵo. Ĉar la ekleziulo ne povas promeni en la kastelo kun pupo en mano, li decidas, ke li kaŝos ĝin sub sia mantelo: kaj li forportas Nanette'on tra la koridoroj, kvazaŭ ĝi estus kara trezoro, kiun li volas kaŝi el rigardoj de ĉiuj homoj.

En sia ĉambro, la abato Vignet tre embarasita decidas, ke li kuŝigos la pupon en komodon, kies ŝlosilon li ĉiam havas en poŝo, kaj en kiu estas liniigitaj liaj ceremoniaj vestaĵoj kaj liaj perlhavaj pastrokraŭtoj. La horizontoj de la pupo estas tute ŝanĝitaj; ĉar reale tia loko ŝajnas tro severa por koketa ludilo. Sen diskuteble la vivo de pupoj similas tiun de homoj ĝi estas minacita de ĉiuspecaj kaj strangeĝaj okazintaĵoj. Ha! se ili povus skribi siajn proprajn historiojn, kiom da eksterordinaraj aferoj ili rakontus al knabinetoj. Tio estus nekredinda.

Ĉu estas bezone aldoni, ke malgranda Jesuo ne ŝanceliĝis aŭskulti la preĝadon de Nelly. La bona avino, redonita al la ameco de siaj genepoj, estis kortuŝita ĝis larmoj, eksciante la oferon de sia kara malgrandulino.

Nanette estis lotita, por ne eksciti jaluzecon inter la malriĉaj knabinetoj de la vilaĝo.

La venontan jaron, post la Kristnaŝka nokto, Nelly vekigante trovis en sia ŝueto belegan pupon, kiu marŝis kaj parolis, kiel vere vivanta virineto. Ĝi estis metita ĉi tien de malgranda Jesuo. Kompreneble la dia infano estis komisiinta la bonan dankeman avinon, ke ŝi faru mem la aĉeton de tiu multekosta ludilo, kaj ĝin pagu per sia propra mono. Post kiam la knabineto estis dankinta profunde sian respektindan prapatrinon, ŝi, montrante la belan ludilon, sin turnis al la guvernisto, kaj diris ridante:

« Nu, sinjoro abato, mi esperas, ke tiu dua pupo okazigos al vi malpli da klopodoj ol la unua. »

Sinjinino VALLIENNE.

**PATER NOSTER**

(El Louis Ratisbonne)



— *Kial do ci haltas, dirante la preĝon?*

*Atentu, ke ci ne restu malantaŭe;*

*Nu! kun mi rediru la Pater, kaj bone.*

— *Donu al ni?*

— *Donu al ni...*

— *Panon nian...*

— *Panon...*

— *Nu, ankoraŭ! kial do haltadi,*

*Kaj murmuri tre mallaŭte*

*Vortojn, kiujn mi ne aŭdas?*

*Patrineto, jen la kaŭzo.*

*Mi preĝis al Dio, por ke li plimetu*

*Kun pano tro seka iom da butero.*

Esperantigis : L. TOUCHEBEUF.

**LA ANIMO DE LA LICENCIATO GARCÍAS**

(Antaŭparolo de la Historio de Gil Blas, el Lesage)



Antaŭ ol legi la historion de mia vivo. aŭskultu, amiko leganto, rakonton, kiun mi tuj diros al ci.

Du lernantoj kuniris de Penafiel' al Salamanque. Troviĝante lacaj kaj soifantaj, ili haltis ĉe la bordo de fontano, kiun ili renkontis sur sia vojo. Tie, kiam ili plu ne soifis, dum ili ripozis, hazarde la lernantoj ekvidis apud si, sur ter-nivela ŝtono, kelkajn vortojn jam iom difektitaj per la tempo kaj per la piedoj de l'brutaroj, kiujn oni kondukis por trinki ĉe tiu fontano. Ili ĵetis akvon sur la ŝtonon por ĝin lavi, kaj ili legis tiujn Kastilanajn vortojn : « *Aquí esta encerrada el alma del licenciado Pedro Garcias. Tie ĉi estas enfermita la animo de la licenciato Garcias.* »

La plej juna el la lernantoj, kiu estis viva kaj mal-serioza, apenaŭ finis la legon de la enskribo, ke ridegante li diris : « Nenio estas pli ŝerca ! Ĉi tie estas enfermita la animo... Animo enfermita !... Mi volus scii kia strangulo faris tiel ridindan epitafon. » Tion dirante li leviĝis por deiri. Lia kunulo, pli prudenta, diris al si mem : En tio estas mistero ; mi volas resti tie ĉi por ĝin klarigi. Ĉi tiu lasas do foriri la alian, kaj ne perdante tempon, li ekfosis per sia tranĉilo ĉirkaŭ la ŝtono. Li faris tiel bone, ke li ĝin formetis. Sube li trovis ledan monujon, kiun li malfermis. Ĝi enhavis cent dukatojn kaj karton, sur kiu estis skribitaj tiuj latinaj vortoj : « Estu mia heredanto, ci kiu havis sufiĉe da spirito por klarigi al ci la sencon de la enskribo, kaj faru pli bonan uzadon ol mi de mia mono. » Kontentega pro tiu eltrovo, la lernanto remetis la ŝtonon, kiel ĝi estis antaŭe, kaj daŭrigis la vojon al Salamanque kun la animo de la licenciato.

Kiu ci estu, amiko leganto, ci baldaŭ similos al unu el tiuj du lernantoj. Se ci legos miajn aventurojn sen atenti la moralajn instruojn, kiujn ili enhavas, ci eltiros nenian akiron el tiu verko ; sed, se ci legos atente, ci trovos en ĝi, laŭ la sentenco de Horaco, la utilon miksitajn kun la agrablo.

Tradukis Vinko

---

## KATOLIK-ESPERANTISTAJ SOCIETOJ

---

La decembra numero de E.K. aperante iom frue post la novembro, ni publikigos la nomojn de novaj anoj nur en E. K. Januara. Ni rememorigas la legantojn pri la celoj de niaj diversaj Katolik-Esperantistaj Societoj.

Por plifaciligi al la komercistoj kaj industriistoj la aniĝon al *Abelo Esperantista*, ni decidis, ke por ili, kiel por la anoj de la du aliaj societoj, *la aniĝo estos senpaga*. La sola kondiĉo estas *aboni E. K.*

Ankaŭ por eviti postulon de mono, ni decidis presi je niaj propraj elspezoj la nomaron de la tri societoj; sed anstataŭ tri Jarlibroj, ni publikigos nur unu, kun la titolo : *Jarlibro de Katolik-Esperantistaj Societoj*. Ĉiu membro de unu el la tri Societoj havos rajton presigi 5-linian anoncon en la fakto *Anoncetoj*, por 6 fr. 50 (20 Sd.). Pri ceteraj anoncoj, duon paĝaj aŭ paĝaj, ni konsentos rabaton da 40 p. cent el la prezo de anoncoj en E. K.

Ni esperas, ke niaj amikoj ŝatos la oferojn kiujn ni ĝoje intencas fari, kaj aniĝos granda-nombre al niaj Societoj.

La Jarlibro aperos en marto 1908. LA DIREKTORO.

#### SOCIETO KATOLIKA INTERNACIA (S. K. I.)

*Estas necese, ke la katolikaj Esperantistoj unuigu por la propagando, kaj interkomuniku. Sen tio ili restos malfortaj. Ili unuigu per S. K. I. La sola kondiĉo de aniĝo estas abonon al E. K. La profitoj estas tre multaj; oni povas uzi la adresaron por mil kaŭzoj: korespondado por turistoj, por lernantoj ĉe pastroj aŭ nepastroj, loĝejoj, servistoj, libroj, ĉiuspecaj informoj. Oni povas fariĝi membro sendante vizitkarton kun literoj S. K. I. kaj oni havas rajton sendi tuj kelklinian anonceton por Universala Komunikilo.*

#### PASTRA ESPERANTISTA FRATARO. (P. E. F.)

La celo estas unuigi la katolikajn pastrojn diversnaciajn por faciligi inter ili, per Esperanto, rilatojn pri pastraj sciencoj kaj ĉiuspecaj religiaj aferoj.

*Notu Bone:* Ni pensas, ke neniu pastro, jam aboninto de E. K. rifuzos esti membro de P. E. F. Tial, ni intencas enskribi en nia proksima N-o la pastrojn, kies nomoj estas en nia abonantaro, *se ili ne skribos al ni por kontraŭdiri.*

#### LA ABELO ESPERANTISTA.

La celo estas unuigi la katolikajn komercistojn kaj industriistojn el diversaj nacioj por faciligi inter ili la komercajn rilatojn, kaj por liveri al la katolikaj Esperantistoj nomaron de samreligiaj komercistoj.

Ni tre rekomendas tiun Societon al niaj legantoj. ~~Eĉ~~ ne Esperantistaj Komercistoj katolikaj povas enskribiĝi. Ili povos sin turni al la Esperantista Konsulo aŭ Oficejo de sia urbo, por traduko de la korespondado. La nomoj de la ne-Esperantistoj estos montrataj per signeto speciala en la *Jarlibro*. *Tiuj, kiuj jam abonis E. K. povas aniĝi sendante vizitkarton kun literoj: A. E.*

---

« HELPO »

*Ligo Internacia de Esperantistinoj por la Protektado de la Virinoj*

---

Okaze de la 3-a kongreso de Esperanto en Cambridge (aŭgusto 1907) la prezidantoj de la 3 unuaj kongresoj proponis la fondon de Ligo Internacia de Esperantistinoj por la Protektado de la Virinoj; la ideo trovis tre bonan akcepton, kaj multe da samideaninoj kaj samideanoj, kiuj ĉeestis la kongreson, sendis al ni sian aliĝon.

La jam ekzistantaj societoj por la protektado de la virinoj ludas tre gravan rolon en la mondo kaj faradas plej grandajn bonojn al la personoj, kiuj serĉas ilian helpon. Preskaŭ en ĉiuj landoj, en multaj urboj jam estas ne nur societoj, sed ankaŭ hejmoj, kie vojaĝantaj virinoj trovas protekton, informon, kio.

Certe en tiaj hejmoj oni ankaŭ sentis la malhelpon, kiu kuŝas en la diverseco de lingvoj kaj tre oftajn malagrablajojn oni povos eviti, se ialoĝe la protektado de la virinoj estas helpata de nia mirinda kaj tre praktika helpa lingvo. Sed kiu devas nun fari la propagandon por enkonduki Esperanton en la nomitajn ligojn kaj hejmojn: certe neniu alia ol la Esperantistoj kaj precipe la Esperantistinoj. Tial la fonda de nia *Ligo Internacia de Esperantistinoj por la Protektado de la Virinoj* estas vera bezono. Ni donis al ĝi la nomon « HELPO », ĉar ĝi intencas helpi ĉiujn helpajn intencojn per la helpa lingvo; helpo do estas ĝia karakteriza momento.

Nia ligo celas atingi la surprenitau taskon jenamaniere :  
 1) ĝi oferas specialan helpon per Esperanto al ĉiuj helpaj societoj ; 2) transdonas al ili propagandan kaj instruajn literaturon ; 3) aranĝos kursojn malkarajn por virinoj ; 4) kreas internacian organizadon por sciigoj, informoj ktp. ; 5) presigas en Esperanto ĉiuj necesajn propagandajn kaj helpajn presaĵojn kaj intencas la eldonon de speciala revuo « Helpo » ; 6) fondas internacian kaj naciajn komitatojn, landajn, distriktajn kaj lokajn ligojn por la protektado de virinoj aŭ aliĝas al la jam ekzistantaj por ilin helpi per Esperanto ; 7) helpas la hejmojn ekzistantajn aŭ fondas novajn por vojaĝantaj virinoj kaj speciale Esperantistinoj.

Via helpo povas efektiviĝi : 1) per persona aliĝo al nia ligo kaj varbado de aliaj anoj (povas aniĝi sinjoroj kaj sinjorinoj, Esperantistoj, kaj ne-Esperantistoj) ; 2) per kolektado de adresoj de helpaj societoj kaj hejmoj, al kiuj ni povas sendi niajn presaĵojn ; 3) per transsendo de ĉiuj sciigoj kaj adresoj al la sekretario ; 4) per morala kaj mona helpo (persona laŭvola kotizo, kolekto da mono en la geamikaro) ; ĉar « Helpo » mem ja ĉiam bezonos la helpon de la ge-Helpanoj.

La nomitaj punktoj nur koncernas la komencon de la laboro ; sed kun la helpo de multe da sindonemaj Esperantistinoj ni esperas atingi paŝo post paŝo niajn celojn por la bono kaj beno de ĉiuj virinoj.

*La provizora Sekretario,*

*FR. SCHNEEBERGER, pastro.*

Lüslingen (Solothurn), Svisl.

## UNIVERSALA KOMUNIKILO

*(Rezervata al la abonantoj de Espero Katolika.)*

**Enketo pri hejma laboro de virincj.** — S-o L. Polart  
 rue Mozart, 44, Paris, deziras informojn el gesperant-



istoj pri la virinoj laborantaj hejme, por studadi ĉion, kio estas farata por helpi ilin. La rezultato de l' enketo — se estas sufiĉe multaj respondoj — estos publiĝata en E. K.

**Katolika makleristo.** — S-o Andreu, parokestro en Fourques (Pyrénées-Orientales), France, pro amo al la popolo laboranta kaj al la popola trinkanta, deziras konigi kaj vendigi vinojn ruĝajn aŭ blankajn, kiujn produktas la suna Roussillon'o. Tie ĉi vinberkulturistoj rikoltas vinojn titolantajn 8 gradojn ĝis 17.

Esperantistoj francaj aŭ fremdaj povos sin turni konfide al la pastro dirita. Unu barelo de vino ruĝa (10 aŭ 12 gradoj) afrankite en Franclando kostos 80 fr. (31 Sm.70).

La fremduloj pagos plie aliajn elspezojn, tio estas, limimpostojn, kc. Tiuj ĉi estas petataj sendi sumon (80 fr.) kun mendo por eviti komerĉan komplikadojn. — Vinoj liturgiaj por meso.

## PAĜO DE L' DIREKTORO

*La Direktoro de E. K. respondos nur al tiuj, kiuj sendos poŝt-karton kun responda flanko, aŭ internacian respondan kuponon.*

**Por presi en E. K.**, ĉiam sendu tekston skribitan nur sur *unu* flanko de l' papero. Pro neplenumo de tiu kondiĉo, multaj artikoloj aŭ informoj ne estas presitaj.

**Nia decembra Numero** enhavas longan Kristnaskan rakonton. Pro tio ni devas prokrasti la *Propaganda Kroniko* kaj aliajn informojn.

## EN LA MONDO ESPERANTISTA

**Noto.** — Oni scias, ke la Delegacia Komitato konigis al nia *Lingva Komitato* sian decidon pri la elekto de Esperanto, kiel plej taŭga lingvo internacia, kun rezervo de kelkaj ŝanĝoj. Nune la du Komitatoj interdiskutas.

*Espero Katolika* estante revuo, kiu *uzas* lingvon internacian, ne povas esti indiferenta al tiu interdiskutado; sed estante revuo *specialista*, kaj *ne propaganda*, kiel la naci-Esperantistaj gazetoj, E.K. ne volas pridiskuti la temon de reformoj. Tamen, por ke niaj legantoj estu informataj pri la stato de l'demando, ni analizas aŭ represas la artikolojn aperintajn en la gazetoj. Ni rememorigas, ke tiu represado ne signifas aprobon.

P-o Richardson, ne akceptanta la opiniojn de nia kunlaboranto E. Lime, sendas al ni leteron, kiun ni bonvole presigas ĉi-sube.

LA DIREKTORO.

*Al la Redaktoro de « Espero Katolika ».*

Kara Kunfrato,

Kiam mi konsentis anstataŭi vin kiel Sekretario de la Katolika Komitato, dum la Tria Kongreso, mi estis tutmalĝoja pro la kaŭzo: via bedaŭrinda malsano. Estis, tamen, granda honoro, kaj plezuro por mi, helpi vin, eĉ iomete en tiu momento.

Vi, kiel Redaktoro de ĵurnalo vere internacia, estas prava permesi al viaj korespondantoj doni novaĵojn pri ĉio, kaj vi estas *neniel* responda je la opinioj de viaj korespondantoj. Sed mi ne estas redaktoro, tamen, dank' al vi, mia nomo nun havas kelkan influon ĉe la Esperantistaro. Do, mi deziras ke, en tiu grava momento, mia opinio estu konata de ĉiuj. Mi restas, kaj ĉiam restos, Esperantisto fidela, unuigata kun la Majstro, kaj kun la Esperantistaro *monda*. Mi akceptas *nur* la *Zamenhofan* « Fundamenton », kun la libereco, rekonita, vorte kaj ekzemple de la Majstro, enirigi malgrandajn ŝanĝojn, per la natura vojo de neologismoj, permesitaj, sed *neniam devigaj*. Mi indigne forpelas la celon de iuj. Ili neniel deziras reformi *iome* nian karan lingvon, sed kontraŭe, anstataŭigi ĝin per *nova lingvo* (plivole lingvaĉo), kiu, laŭ la oportuna esprimo de via korespondanto, volus « mortigisian patrinon », nian « Alma Mater ».

Fine, mi esprimas la deziron, ke ĉiu leganto de via bela



Tamen tia Societo kaj muzika revuo estus tre bone akceptataj de l'Esperantistaro. DOREMI.

### PROMENADO TRA LA GAZETOJ

INTERNACIAJ (Oktobro): *La Revuo* daŭrigas la gravan tradukon « La Rabistoj », de D-ro Zamenhof. — Raportas pri la dimanĉaj diservoj tiamaniere:

« En la du preĝejoj (katolikaj kaj protestantaj) oni aŭdis la samajn parolojn pri frateco, pri amo, la saman komentarion de la ideo, kiun nia Majstro nomas la interna ideo de l'Esperantismo, la saman ideon esprimitan per samaj vortoj, per samaj preĝoj aŭ kantoj. Jam sur la ŝipo dum la veturado de Boulogne al Folkestone, kiam mi vidis pastron Schneeberger kaj abaton Guinart interparolantajn amike kaj ĝoje en nia lingvo, sed nun precipe aŭdante la saman kredon, la saman konvinkon, tiel saman, ke kelkaj demandis min, ĉu anglikanoj ne estas katolikoj, mi demandis min mem, ĉu eble Esperanto povus efektiviĝi tiun miraklon kunigi, unuigi la diversajn partojn de la kristanaro? »

— Ni tre esperas ke Esperanto estos granda kaj potenca helpilo por atingi tiun celon.

Poste oni legas resumon de la prediko de *episkopo (sik)* Richardson: Tre flatanta por pastro Richardson. Li certe estas inda de episkopeco, sed estas bedaŭrinde nur pastro.

En la « Bibliografio », analizo de *Evolucio de la religia ideo*, aparta represaĵo de la artikoloj aperintaj en Internacia Scienca Revuo. « La artikolo de D-ro Vallienne elvokis, ŝajnas al mi, la unuan seriozan kritikon en nia literaturo. Pro malgranda kadro kaj multego da raportoj en nia bibliografia fako mi prisilentas ĝin, forsendante la legantojn al *Espero Katolika* (N-oj 37, 39), kie ili havos interesplenan turniron inter D-ro Melin kaj pastro Peltier de unu flanko, kaj D-ro Vallienne de la dua ».

*Tra la Mondo* Traduko de « Kaprico » aŭtoro estas Alfred de Musset; tradukinto J. Flourens. « La mireginda trekruĉo », Japana fabelo, tre bele kaj multe ilustrita.

Fino de raporto pri la 3-Kongreso (A. Montrosier). Mankas bedaŭrinde la « Monata kroniko pri nuntempaĵoj », kiu perdita estas de la poŝto.

*Lingvo Internacia* ŝanĝis la kondiĉojn de ĝia abono (vidu anoncon) kaj de nun liveras la « Aldonon » al ĉiuj abonintoj « Cambridge, nekongresaj impresoj, » de Th. Cart. S-o Finot kondukas nin ĉe la « Fakiroj de Hindujo ». — « Al la pliboniguloj », poezio de L. E. Meier (el München). Sekvas Komentario : « Certe, kiel ĉiuj vivaj lingvoj, Esperanto evolucios. Sed tia evolucio devas esti *natura* kaj ne povas esti la rezultato de *teoria, sistema* ŝanĝo. Persone, private, en Esperanto, kiel en mia patra lingvo mi povas uzi neologismojn aŭ specialajn dir- aŭ skribmanierojn, kiujn mi nepre bezonas por esprimi miajn ideojn. La Esperantistoj imitos min aŭ ne imitos min. Se la plimulto min sekvos, iom post iom, la nova esprimo « eniros » en la lingvon; se ne, ĝi malaperos » : (Th. Cart.).

Bonege! Kial do malpermesi la uzon de « rogi » aŭ « sani ». La Esperantistoj « uzos ilin aŭ ne uzos ilin ». Libereco tia ne estas danĝera.

*Internacia Sciencia Revuo*. Interesa diskutado pri « Apokalipso kaj Astronomio ». Respondoj al artikolo de S.-o Morozov pri sama temo. — Raportas pri la fondo de I. S. Asocio Esp. dum la 3-a Kongreso.

*Esperanto* (27 okt.) resumas la historion de la Delegacio por alpreno de lingvo internacia, kaj raportas pri la agado de la Komitato de l'Delegacio. — Pri la Esperanta literaturo oni legas « Nia literaturo estas ankoraŭ malriĉa kompare kun la riĉegaj naciaj verkaroj; ĝi estas infanaĝa kompare kun la naturaj idiomoj, prilaboritaj dum jarcentoj per miloj da verkistoj kaj pensistoj la Esperanta stilo estas en periodo de kreigado; pro tio la nunaj verkoj prezentas apartan gravecon kaj havas grandan influon sur la estontan evoluadon de nia lingvo.

« Oni pardonu tiujn tro didaktikajn liniojn, kiujn ni skribis por tiuj el niaj samideanoj, kiuj ne kontentiĝas sin per supraĵa lernado de Esperanto. En venonta artikolo,

ni priparolos la ĉefajn aŭtorojn de la Esperantista verkistaro, kaj provos eltiri karakterizon pri ili kaj praktikan konkludon por la personoj, kiuj per la plej facila vojo deziras penetri en la ĝardenon, kie brilas la floroj de nia literaturo. — A. R. »

**NACIAJ : *L'Esperantiste*.** Pri la agado de l' « Delegacio », S-o de Beaufront skribas : « La Komitato de la Delegacio kunsidis ĉe Parizo (Collège de France) en la mateno kaj post-tagmeze dum 10 tagoj, por plenumi la rolon, kiun komisiis al ĝi 310 diversaj societoj el diferencaj landoj. Ekzameninte ĉiujn eblajn solvojn kaj kunvokinte la aŭtorojn de la sistemoj proponitaj, ĝi decidis alpreni Esperanton principe pro ĝia rilata perfekteco kaj la multaj diversaj aplikoj, kiujn ĝi ricevis, kun rezervo pri diversaj ŝanĝoj... » La decido de l'Delegacio kaj tiuj ŝanĝoj estas komunikitaj al doktoro Zamenhof kaj al la Lingva Komitato. Pro la bono de Esperanto kaj sekve pro la bono de l'ideo mem de helpa lingvo internacia, ni ne povus tro admoni ĉiujn niajn amikojn, ke ili atendu la respondon de doktoro Zamenhof kaj de la Lingva Komitato kviete kaj konfide, nenion dirante, skribante aŭ farante kapablan kompromiti interkonsentiĝon senlime dezirindan ».

S-o de Beaufront plipresas jenan deklaron : « Oni kolportas la famon, ke mi penas, sub pseŭdonimo, enkonduki per la Delegacio sistemon, kiun mi oferis al Esperanto dum 1888. Mi do deklaras, ke l'Adjuvanto nek ĝia aŭtoro *neniam estis por io* kandidatoj antaŭ la Delegacio kaj ke ĉe unu paĝo de mia sistemo ne eliris, de la jaro 1891, el la forta kofro de l'notario, al kiu mi ĝin donis por esti post mia morto transigita al la plenumanto de mia testamento ».

*Germana Esperantisto* kaj ĝia aldono *Liberaj Horoj* estas nun tre atentindaj, tial ke la 4-a Kongreso okazos en Germanlando. Jam aperis listo de preskaŭ 200 aliĝintoj por la 4-a. — Citas en kroniko la respondon de M-ro Foucault al E.K. pri la neŭtraleco de Esperanto; anoncas la fondon de niaj katolikaj societoj. Dankon.

*British Esperantist*. Fino de l'raporto pri la 3-a. En

« Postkongresaj festoj en London », oni legas informojn pri diservo en preĝejo St-Clement Danes, tute en Esperanto, kun prediko de Pastoro A. Poynder el Cheltenham. S-o D.-H. Lambert legis la lecionojn.

*Suno Hispana.* En Kroniko : « Oni fondis grupon en Parizo ĉe la « Association Franciscaine », kaj alian en Beauvais'o. En *Kongreso Jeanne d'Arc*, respektinda episkopo kontraŭstaris proponon akcepti Esperanton en estontaj kongresoj, tial ke, laŭ li diris, *esperantismo estas entrepreno framasona*. Multaj katolikaj esperantistoj montris al Lia Moŝta sinjoro lian eraron, kaj li konvinkita respondis : *Mi tute konfesas, ke la lingvo Esperanto estas nur ilo, kiu povas utili same por Vero kaj malvero.*

Por trankvileco de la Esperantistoj katolikaj kaj por honori la noblecon de Monsinjoro Foucault, ni rilatas tiun aferon, pri kiu ni silentis ĝis nun, tial ke ni atendis tiun fratan finon. »

*The American Esperanto Journal.* Okaze de l'agado de *Delegacio* : « La Delegacio konservas plenan neŭtral-econ rilate al la diversaj projektoj de internacia lingvo... Kelkaj legantoj demandas, kial ni devas lerni Esperanton, vidante ke la Delegacio povas elekti alian lingvon aŭ verki mem novan lingvon. Nia respondo estas : Legu la artikolon « Esenco kaj esonteco de la Ideo de lingvo internacia », p. 268 de *Krestomatio* (aŭ unu el la apartaj eldonoj de Hachette, Moller k. Borel, kc.). La konkludo de tiu artikolo estas, ke *kio ajn kontentiga internacia lingvo devos enhavi 9 dekonojn de Esperanto*. Se do vi konos Esperanton, vi bezonos ĉirkaŭe unu semajnon por lerni tian alian lingvon. » — Citas la tuton de la artikolo de nia Direktoro pri « Sukceso de gazeto », aperinta en E. K. N-o 37. Koran dankon.

*Amerika Esperantisto* havas nun sian Oficejon en Chicago, 1239, Michigan Avenue. Diskutas pri la « American Esperanto Association » kaj pretendas, ke ĝi ne ekzistas laŭ-leĝe (artikolo redaktita Angle). — Pri nia *Katolika Preĝaro* « Kredeble estos plua volumo, ĉar



tiu ĉi estas stampita « 1-a volumo ». Kompreneble tiu ĉi libreto (180 malgrandaj paĝoj) tre plaĉos niajn katolikajn samideanojn, kaj al ĉiu sciemulo serĉanta la kuriozajn elmontrojn de la homa naturo ĝi prezentus multe da materialo. » — Jes, estos du aliaj volumoj.

*Svisa Espero* raportas pri la 5-a ĝenerala Kunveno de la S. E. S. — *Casopis Ceskych Esperantistu* estas tute dediĉita al la 3-a Kongreso. — *Verda Stelo*, orgaĥo nova de Meksiklando, estas bonega N-o de propagando. — *Lorena Esperantista Jurnal*o, ĉiam akurate informas la grupanojn de Nancy pri la kunvenoj kaj lecionoj. — *Saksa Esperantisto*, redaktita tute en Germana lingvo.

*Esperanto Bladet* enhavas gravan artikolon pri « Okazontaĵo de oktobro », t. e. pri la Kunveno de la Delegacia Komitato « Pri la rezultato de la elekto estas nature plej singardeme ne profeti, sed oni do povas supozi kun granda certeco, ke la preferota lingvo havos nomon, kiu ne estas tute nekonata por la Esperantistoj. — Tamen oni devas ankaŭ rigardi la eblecon, ke la elektonta komitato ne deziras doni al la ekzistanta artefarita lingvo sian absolutan rekomendon, sed proponus elekti ekz. Esperanton kun iaj, detale klarigitaj, ŝanĝoj; je ĉi-tia ebleco ĉiu Esperantisto devas kalkuli, pripensi, kaj klarigi al si sian rilaton. Estas malsaĝe opini, ke oni tute povos ignori la decidon de la komitato, se ĝi estos kontraŭa al Esperanto; ĉar nur la nomoj de la membroj estas certigo, ke ĝi estas treege kompetenta por prijuĝi la demandon (kiel konate i. a. Prof. O. Jespersen estas membro).

ALIAJ GAZETOJ RICEVITAJ *Eno Esperantista Juna Esperantisto* (sept.); *Finna Esperantisto*, nova kunfrato el Finnlando, sur granda 8-paĝa formato, raportas pri niaj eldonaĵoj. Dankon kaj bonvenon! — *Espero Pacifista* (aŭg.-okt.), sin senkulpigas pri malfrueco, promesas akuratecon, kaj liveras kiel Aldonon « Jarlibro de Pacifisto »; — *Ruslanda Esperantisto* (aŭg.). El la raporto pri la 3-a Kongreso « Ĉiuj eklezioj vigle akceptis tiun ĉi ilon; nur ortodoksa dume senvekiĝe dormas, zorgante



nur, ke ne estu tuŝitaj ĝiaj malnovaj kutimoj. Cetere, kio estas en tio ĉi mirebla? Se la suprujoj de nia ortodoksa eklezio ĝis nun preferas, ke la diservado en niaj preĝejoj estu plenumata en preskaŭ nekomprenebla por rusa popolo slava lingvo kaj neniel povas konsenti, ke ĝi estu tradukita en rusan linvon, do ĉu ili povas pensi pri traduko de Biblio en Esperanton? Pro tio ne estas mirebla kaj tiu cirkonstanco, ke la reprezentantoj de ortodoksa eklezio ĉeestis nek unuan, nek duan, nek trian Kongresojn! »

Prof. E. LIME.


## 'SAKOJ

(Sub la redakcio de S-o AL. WAGNER, STANISLAU, 2. Aŭstrujo.)

### Problemo XVII-a

Komponis S. Loyd

Nigro : 10 pecoj.



Blanko : 6 pecoj.

Blanko komencas kaj mortigas per la 2-a iro.

ŝakmortiĝus, se nur li povus rezigni sian iron; sed li devas precize iron fari kaj se li movas iun ajn kurieron, kovras

### Solvo de Problemo XV-a de S. Loyd

1 iro de B : Db2 — a1!

'Guste solvis : W. W. Padfield,  
Ipswich.

### *Pri la ŝakproblemo*

#### III

En antaŭaj tri ekzemploj la Blanko faranta unuan iron minacas tujan ŝakmortigon. La bonstrumiero de tiuj ĉi problemoj estas la *minaco*. Kontraŭe, hodiaŭa problemo xvii-a solviĝas per mira kaj nekomprenebla *trankvila* iro, ĉar la B. farante ĝin minacas nenian akmortigon. La N. havas bone defendatan pozicion kaj neniel

turojn; se li movas iun ajn turojn, kovras kurierojn. La N. irante malbonigas sian defendan pozicion kaj ĉiu-okaze ŝakmortigos. Ni nomas tion *tempo perdita* kaj tian trankvilan antaŭiron *tempogajnanta*.

'Cirkaŭ 1860, kiam la problema literaturo komencis belege sin disvolvi, la multaj ŝakkomponistoj formadis apartan skolon nomatan la *amerikana*, laŭ ĝia geniala gvidanto, Amerikano *Samuel Loyd*.

Tiu ĉi skolo penadis precipe malfaciligi la manieron por ŝakmortigi. 'Gi prezentadis belegajn spritaĵojn kaj originalajn kombinojn. 'Gi zorgadis la multeca de la variantoj, en kiuj sin perdus la okulo de la solvanto. 'Gi postulis ke *la antaŭiro ne estu ŝakanta*, por ke la N. havu liberecon en la defendo. Dum tiu ĉaso, post malfacileco, eltrovita estas la gajno de la tempo. Tiam estis tio la novaĵo kaj malfermis kampojn por la novaj kombinoj. La tempogajnanta konstruo estis la plej konvena maniero por la prezento de profundaj ekpensoj.

### Ludo XVII-a

#### Damallogaĵo rifuzita

Ludita ĉe la jubilea turniro de  
Berlina ŝaksocieto.  
18 okt. 1907

Blanko :

Nigro :

Teichmann

E. Cohn

1. S — 4D

S — 4D

2. C — 3KR

S — 4KD

3. S — 3R

Ĉ — 3KD

4. S — 4KD

S — 3R

5. DS × S

K × S

6. S — 3TD

C — 3KR

7. S — 4CD

K — 3D

8. K — 2Ĉ

S × S

9. K × S

S — 3TD

10. Reĝsaltas.

Reĝsaltas.

11. DC — 2D

S — 4R

12. S — 5Ĉ

S × S

13. K × S

D — 2R

14. Ĉ — 4KD

T — 1D

15. K × Ĉ

S × K

16. C × K

T × C

17. D — 2KD

S — 5R

18. C — 5R

K — 2C

19. TR — 1D

T — 3R

20. D — 3KD

T — 1D

21. T × T

D × T

Nula ludo.

*Nota.*— Por klarigo de la ciferoj kaj literoj, kiuj montras la lokon de la pecoj, vidu la figuraĵon de Problemo XVI-a en E. K. oktobra (p. 30).

*Le Directeur-Gérant, EM. PELTIER.*

Presejo de *Espero Katolika*. Sainte-Radegonde (l.-et-L.), FRANCE

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revuo de Franca Pastraro*). — Redaktoro : Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio : Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono, 23 fr. (En Franc. 20 fr.). 110 paĝoj duonmonate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

L'ACTION FRANCISCANNE (*Franciskana Agado*). — Monata organo de Franciskanaj Asocioj. Bonega Franca revuo 32-paĝa. Pritraktas socialajn demandojn. — Abono jara 7 fr. (6 fr. en Franc.). Administr. 117, Bd Raspail, Paris. - 6<sup>e</sup>.

LES LANGUES VIVANTES (*La Vivaj Lingvoj*), Angla, Germana, Itala, Hispana, Franca kaj Esperanta. Ilustrita Revuo duonmonata. — Eldonita de la firmo Bloud, 4, rue Madame, Paris.

Abonoj :	PLENA REVUO	3 LINGVOJ	2 LINGVOJ	1 LINGVO
Franc.	7 fr. 50	6 fr.	4 fr. 50	3 fr.
Ekster Fr.	9 fr. 50	7 fr.	5 fr. 50	4 fr.

LA REVUO. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D-o ZAMENHOF. — Ce Hachette kaj Ko, Paris. — Jare. Francujo Fr. 6; ceteraj landoj Fr. 7 fr.

LINGVO INTERNACIA, centra organo de la Esperantistoj, 48 paĝoj (13 × 20 cm.), nur en Esperanto. Literatura aldono, 16 paĝoj. Jara abono : 7 fr. 50 (3 sm.). Administracio Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

ESPERO PACIFISTA, monata organo de la *Societo por la Paco*. — Abono, 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-o Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

TRA LA MONDO, tutmonda multilustrita revuo esperanta, — Nuntempaĵoj; artoj, literaturo, scienco; komercio; industrio; militistaro, maristaro; teatro, sportoj; virina kaj gejunula paĝo; felietono: ludoj; konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare 8 fr.; kvaronjare 2 fr. 25. — Turnu vin 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtoŝtupoj.

KOLEKTISTOJ : S-o VARJU Endre, Budapest, IV, Kygio U-E 62, em, 14, kolektas kaj interŝanĝas uzitajn poŝtm.

KOMERCAJ VOJAĜISTOJ ATENTU! — Vojaĝisto estas dezirata en Franc. por preslaboroj kaj libroj Esper. Nenia speciala instruado necesa. — Skribu al la Direktoro de E. K.

---



---

## KATALOGO DE ESPERO KATOLIKA

---

- Katolika Preĝaro**, 1-a volumo, 180 p., kun *Imprimatur* de M-ro Renou, Ĉefepiskopo de Tours . . . . . 2 fr. 50
- Kato kun botoj**, luksa eldono, 6 ilustraĵoj. . . . . 0 fr. 50
- Cindrulino**, el sama kolekto, 6 ilustr. . . . . 0 fr. 50
- La du verkoj kune mendataj* . . . . . 0 fr. 75
- La Katolikaj Esperantistoj ĉe la 2-a Kongreso de Esperanto en Genevo (1906)**. Plena raporto kun la prediko de P-o Em. Peltier . . . . . 0 fr. 15
- Hebrea Kalendaro**, originale verkita de Pastro Jakobo Bianchini (Italo), kun *Imprimatur* de M-o Renou, Ĉefepiskopo de Tours . . . . . 0 fr. 20
- Patro Nia**, ĥoro por soprano, aldo, tenoro kaj baso, dediĉita al la *Tria Kongreso* kaj kantita dum la meso por Katolikoj en Cambridge. Teksto kaj kompono de Johano GOTHARDO (154-a verko); 6 paĝoj da muziko. Aĉetebla pogrande nur ĉe *Espero Katolika*. Prezo : 60 Sd., 1 M. 25. . . . . 1 fr. 50
- Pri unu speco de kurbaj linioj, koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton**. Verkis Profesoro DOMBROVSKI (2-a eldono). . . . . 0 fr. 65
- Pri novaj trigonometriaj sistemoj**. Originale verkis Prof. DOMBROVSKI . . . . . 1 fr. 80
- Aĉeteblaj *po-grande* nur ĉe *E. K.*
- KATOLIKAJ KUNVENOJ DUM LA TRIA KONGRESO** en Cambridge (1907) . . . . . 0 fr. 25
- PER TELEFONO**, sceneto de Jacques Freneuze; kun permeso de l' aŭtoro tradukis Josée GUIVY. . . . . 0 fr. 15
- 

### PLENA KOLEKTO DE ESPERO KATOLIKA

1-a SERIO : 1-a j., — 2-a j., kaj 5 n-oj de la 3-a jaro). Ĉiu jaro : 2 fr. (dek kajeroj da 88 paĝ.). Duono de la 3-a jaro (gis marto 1906) 1 fr. — (La kolekto gis marto 1906 : 5 fr. a frankite).

2-a SERIO : Duono de la 3-a jaro (de marto 1906 gis oktobro 1906) — 4-a jaro (de oktobro 1906 gis oktobro 1907) : 7 fr. 50 (En Franc. 6 fr.)

---

## KATOLIKA PREGARO

EN KIU TROVIĜAS ĈIUJ DIMANĈAJ DISERVOJ

KAJ

LA PLIMULTO DE LA FESTOJ DE L' JARO

*Latine kaj Esperante*

APROBITA DE LIA ALTA MOŝTO M-O RENO

*'Ĉefepiskopo de Tours (France)*

1-a volumo.— Prezo : 2 fr. 50 (1 Sm.); biĉdita : 3 fr. 10 (1 Sm. 20)

---